

O BRASIL ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 94-96 (380-382)

Telegrafa adreso: ESPERANTOLIGO

Outubro-Dezembro 1945

Redator responsável:
Dr. Carlos Domingues
Telefone — 42.4357

Administração e redação:
Praça da República, 54-sob.
Rio de Janeiro. Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15
respondkuponoj.

BRAZILA REGISTRARO KAJ ESPERANTO

Sekve de la politika movado, okazinta la 29an de Oktobro lastjara, forlasis la prezidantecon de la Brazila Respubliko D-ro Getúlio Vargas, kiun anstataŭis la Prezidanto de la Supera Federacia Tribunalo, S-ro Ministro José Linhares.

Ĉe la organizado de la Ministerio ni havis la plezuron vidi, ke estis nomita Ministro por Edukado kaj Saneco S-ro

Profesoro Raul Leitão da Cunha, kiu, tiam Rektoro de la Brazila Universitato, faris ĉe la Deka Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Rio de Janeiro, la belan kaj erudician paroladon, kiu ĝin malfermis.

Estis ankaŭ granda nia ĝojo pro la elekto de nia bona amiko S-ro Ambadoro José Carlos de Macedo Soares, al kiu tiom ŝuldas Esperanto, por la

ofico de Regdelegito de São Paulo, la plej grava ŝtato de la Federacio.

Gratulante tiujn du eminentajn bonfarintojn de la Esperanta afero en Brazilo, "O Brasil Esperantista" voĉdonas por ke en siaj novaj oficoj ili povu fari plu al la lando la grandajn servojn, per kiuj ili sin rekomendis al la estimo de siaj samcivitanoj.

AL LA NOVJARO 1946a

Fine, post longa, sesjara, freneza regado de la kruela, detrua milita megero, falis la kontraŭhumana, barbara ĥimero de Mussolini, de Hitler kaj moŝto Mikado.

Nova nun jaro alvenas, sen tinto de spado; mildan rideton ĝi portas, de bona espero pri l' malkreskado de l' peza homara sufero, pri bonsukceso de paca labor' kaj persvado.

Petu ni Dion ke tiun laboron Li benu! Ĉiuj nacioj fratece pro Bon' kunlaboru! Ĉiuj justecon kaj amon kaj veron honoru!

De l' pasinteco erar' la progreson ne ĝenu! Nova la jar' de feliĉo do estu portanto al la homaro kaj servant', Esperanto!

Francisco V. Lorenz.

Dom Feliciano, R. G. Sul, Brazilo.

DELEGITOJ DE INTERNACIA ESPERANTO-LIGO (IEL)

Povas fariĝi Delegito, Vic-Delegito aŭ Fak-Delegito de IEL ĉiu membro MJ, MA aŭ MS, kiu por tiu honora ofico pagos nenian plian kotizon. Ĉiu Delegito devas varbi membrojn por IEL kaj fari propagandon de Esperanto en sia loko. La Vic-Delegito anstataŭas la Delegiton, kiam tio estas necesa. La Fak-Delegito funkcias precipe pro sia sperto en sia fako. La Delegito ricevas Delegitan Karton, reklam-ŝildeton kaj la Oficialan Buletanon, kiu aperas laŭnecese. Lia nomo estas presata en la Jarlibro de la Ligo.

Kiu dezirus akcepti la oficon de delegito, bonvolu peti formulon al Brazila Ligo Esperantista.

AL LA GESAMIDEANOJ

Kristnaskon Gojan, Amikoj Karaj!
Reciproki hodiaŭ voĉoj de Paco kaj Amo,
Indulgante unu la alian, devas ni,
Samideanoj Estimataj!

Tiel niaj koroj ektagiĝos Kristane,
Obeemaj al Jesuo Kiu en ili volas logi.

Jaron Novan tre Feliĉan, Fratoj!
Estas ankaŭ alia sincera deziro mia,
Samideanoj Bonkoraj:

Unueco en kunlaborado nia firmiĝu multe
[pli,

Okaze de l' Novjaro 1946a.

Luis A. Silos

PAGU VIAN KOTIZON POR LA JARO 1946a

BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

Je la 19a de Oktobro 1945a, sub la prezido de Ing. A. Couto Fernandes, Brazila Ligo Esperantista efektiviĝis ĝenerala kunsido, kiun ĉeestis, krom estraranoj, la reprezentantoj de la jenaj aliĝintaj grupoj: Brazila Klubo "Esperanto", Centro Esperantista de Santos, Esperanta Grupo de Bahia, São Paulo Esperanta Klubo, Pernambuco Esperanto-Asocio, Esperanta Asocio de Rio Grande do Norte, Centro Esperantista de Juiz de Fora, Centro Esperantista Granberyense, Grupo Esperantista "Francisco V. Lorenz", Associação Esperantista do Rio de Janeiro, Clube Esperantista S. Jorge, Esperanta Grupo de Barra Mansa kaj Esperanto-Grupo Zamenhof kaj aliaj membroj. Post la aprobo de la protokolo de la antaŭa kunsido, la Prezidanto eldiris la rimedojn prenitajn de la estraro por plenumi la rezoluciojn aprobitajn dum la Deko Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Rio de Janeiro, kies eksterordinara brilo kaŭzis senteban pligrandigon de liganoj, fondon de novaj grupoj kaj reorganizon de malnovaj, en tiu ĉiu urbo, kaj en la ŝtatoj Minas Gerais, São Paulo, Rio de Janeiro, Pernambuco, Santa Catarina, Bahia kaj Rio Grande do Sul, kaj, venintaj el Eksterlando, multenombrajn gratulojn kaj petojn de ekzempleroj de la memorigaj poŝtmarkoj kaj folioj kaj de la publikigaĵoj eldonitaj je ĝia honoro. Li elmontris diversajn publikigaĵojn venintajn el landoj, kiuj estis sub la germana superregado, precipe el Francujo, Nederlando, Belgujo kaj Ĉekoslovakujo kaj reliefiĝis la ĉiam kreskantan nombron da novaj membroj de "Internacia Esperanto-Ligo", kun sidejo en Anglujo. Laŭ propono de S-ro Ismael Gomes Braga kaj de aliaj liganoj estas akلامita Honora Prezidanto de Brazila Ligo Esperantista, la plejalta estaĵo en Brazilo, S-ro Ambadoro José Carlos de Macedo Soares, pro liaj rimarkindaj servoj faritaj al la esperanta afero en nia lando.

Estas konsideritaj bonfarintaj anoj de BLE S-roj A. Couto Fernandes, Carlos Domingues kaj D-ro Luiz Pôrto Carreiro Neto, kiuj donacis al ĝi naŭcent ekzemplerojn de la Vortaro Portugal-Esperanta, kiun ili verkis, krom aliajn lernolibrojn ricevitaĵojn de ili interŝanĝe de ekzempleroj de tiu vortaro. La du unuaj ankaŭ donacis al la Ligo okdek ekzemplerojn de la Vortaro Esp.-Portugala, kies aŭtoroj ili estas.

Laŭ la Regularo de la Ligo estas donita la diploma de "Profesoro aprobita" al S-ro Aldino de Freitas.

S-ro Délio Pereira de Sousa, kasis-

ĜEKZAMENOJ DE ESPE- RANTO

Je la 4a de Novembro lasta, en kvartalo Penha, en urbo Rio de Janeiro, okazis ekzamenoj de la kurso de Esperanto, kiun direktis S-ro Délio Pereira de Souza, organizita de "Associação Esperantista do Rio de Janeiro". La ekzamenintaro konsistis el la instruinto, kiu estas samtempe prezidanto de la Asocio, kaj S-roj Haroldo Leite Pinto kaj Francisco Do-

to de la Organiza Komitato de la Deko Brazila Kongreso de Esperanto, post ekzameno kaj aprobo de siaj kontoj, fare de Komisiono nomita de S-ro Ambadoro José Carlos de Macedo Soares, transdonis al S-ro Odilo Pinto, kasisto de la Ligo, ĝian saldon, konsistantan el Cr\$ 4.209,40.

Laŭ propono de D-ro João B. de Melo e Souza, oni decidis donaci al la Nacia Instituto de la Libro tricent ekzemplerojn de ĉiu el la du jenaj publikigaĵoj: "Que é o Esperanto?" kaj "O Esperanto no Brasil", eldonitaj de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko honore de la Deko Kongreso, kaj sendi al Internacia Esperanto-Ligo, laŭ ties mendo, cent ekzemplerojn de la dua eldono de la libro "Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo", el la okcent donacitaj de tiu Instituto al la Ligo por esti sendataj eksterlanden. BLE ilin bindigos por ke ĉiu estu vendata por dek-du ŝilingoj.

La prezidanto nomis S-rojn Carlos Domingues, Ismael Braga kaj Délio Pereira de Souza, por ke ili studu kaj prezentu al la proksima kunsido la modifojn farotajn en la Regularo de BLE, konsiderante la lastajn progresojn ĉe la Esperanto-movado en Brazilo. Oni donis al la Estraro de BLE la rajton nomi komisionon por organizi la "Libron de l' Lernanto" kaj la "Libron de l' Instruisto", por ke ili servu kiel modelon por la estontaj kursoj de Esperanto.

La prezidanto sciigis la ĉeestantaron, ke la proksima numero de la "Revista de Estatística", eldonata de tiu Instituto, publikigos, en portugala lingvo, detalan raporton de la laboroj de l' Deko Kongreso; en Esperanto, la "Statistikan Resumeton", rilatan al la jaro 1942a, kaj, en la portugala kaj esperanta lingvoj, malgrandan Statistikan Terminologion.

Estas aprobitaj kondolencaj voĉoj pro la mortoj de D-ro Venâncio da Silva, honora vicprezidanto de BLE, kaj S-roj Honório Leal kaj José Couto Fernandes, kunfondintoj de Brazila Klubo "Esperanto".

Neniu petinte la parolon la Prezidanto fermis la kunsidon.

blas Filho. Estas aprobitaj la jenaj ĝekzamenitoj: Magnólia de Lima, kun distingo; Juranci de Almeida, Aurélio Cesar dos Santos, Vitória Regis de Lima, Olinda da Silva Barros kaj Estêvam Fernandes Moreira, plene aprobitaj; José Francisco de Lima, Helianto de Siqueira Lima, Pereci de Siqueira Lima, José Carlos dos Santos kaj Rossine Lopes da Fonte, simple aprobitaj.

Post la ekzamenoj parolis, en la nomo de la ekzamenintaro, S-ro Aurélio Cesar dos Santos, kaj responde, S-ro Délio Pereira de Sousa.

Je la unua de Decembro lasta, ĉe la sidejo de Brazila Klubo "Esperanto", efektiviĝis la ekzamenoj de ĝelernintoj de la kurso de Esperanto, malfermita la 16an de Junio nunjara de F-ino Maria do Amaral Malheiro. Jen la rezultato de la ekzamenoj, kiujn prezidis S-ro A. Cactano Coutinho kaj en kiuj oficis kiel ekzamenintoj S-ro A. Couto Fernandes kaj Carlos Domingues: Ignez Rocha, Maria Helena A. da Silveira, kaj Joaquim Mendes da Rocha, plene aprobitaj kun distingo; Neusa da Silveira Muniz, Luiza Celeste Almeida Lopes, Clélia da Silveira Muniz, Ludwig M. Santos kaj Maria de Lourdes Maia Marinho, plene aprobitaj.

Je la unua de Decembro lasta, ĉe la sidejo de la "Brazila Spiritisma Federacio", okazis la ekzamenoj de ĝelernantoj de la kurso de Esperanto tie instalita dum la monato Junio de S-ro Onésimo Faria kaj daŭrigita de S-ro Haroldo Leite Pinto. Jen estas ĝia rezultato: F-ino Yolanda de Araújo Costa, F-ino Nancy Cassão de Castro kaj S-ino Edith Montarroyos de Moura Costa, plene aprobitaj kun distingo; D-ro Alcides Neves Ribeiro de Castro, F-ino Laura Rebello de Carvalho, S-ino Julita Duarte Mendonça de Carvalho, Manoel Barbosa de Mello, S-ro Alfredo Moreira Agra kaj F-ino Rebello de Carvalho, plene aprobitaj kaj F-ino Dalva Alves Farias, aprobita. Oficis kiel prezidanto S-ro Ismael Gomes Braga, kaj ekzamenintoj S-roj Haroldo Leite Pinto kaj Délio Pereira de Souza.

La sepan de Decembro okazis en Florianópolis, ŝtato Santa Catarina, ekzamenoj de Esperanto de lernintoj de la kurso, kiun direktis S-ro Giovanni Faraco, prez. de "Esperantista Klubo de Florianópolis". Estas aprobitaj la jenaj ĝelernintoj: Washington Luiz do Vale Pereira, Valmy Bittencourt kaj Irene Kreiling plene aprobitaj kun distingo; Dylton do Vale Pereira, Hélio Joaquim Alves, Werner Springmann kaj Marta Springmann, plene aprobitaj.

LA FAMILIO ZAMENHOF EN VARSOVIO

El letero de D-ro Stephan Zamenhof, nun loĝanta en Nov-Jorko:

... Mi ĵus ricevis korespondaĵon de Varsovio (datumita en Marto, 1945), Ĝi informas nin ke *S-ino Wanda Zamenhof*, edzino de Adam (filo de D-ro L. L. Zamenhof), kaj ŝia juna filo Ludoviko (nepo de D-ro L. L. Zamenhof) ankoraŭ vivas, kaj troviĝas en Varsovio. La adreso estas: *Lowicka 39a, Mokotow, Warsaw, Poland.*

Mia kuzino, F-ino Roma Zamenhof (nevino de D-ro L. L. Zamenhof) sendis la korespondaĵon. Ŝi mencias kelkajn aliajn gekuzojn en Varsovio, sed ne troviĝas ĉe unu vorto pri Lidja Zamenhof aŭ la fratino Sofia.

Pri Adam Zamenhof, filo de D-ro L. L. Zamenhof, li estis mortigita en Germana malliberejo frue en la komenco de la milito. Ni jam scias pri liaj suferado kaj murdo. Povas esti ke Lidja loĝas en alia urbo, sed ŝajnas neeble ke la familio en Varsovio ne scius pri ŝia sorto. Pro tio mi havas nenian esperon ke ŝi nun vivas.

Kiel vi jam scias, la popolo de Varsovio malsatas kaj mankas vestaĵoj. Ni sendas pakaĵojn regule al la Varsovio adreso, sed kompreneble unu, du maloftaj pakaĵoj ne longe sufiĉas. Eble la Esperantistoj de Ameriko tre volonte helpos la 15a jaran nepon de D-ro L. L. Zamenhof, nome Ludoviko kaj lia patrino. La pakaĵoj (manĝaĵoj kaj vestaĵoj) povas esti sendataj pere de:

World Jewish Congress, 1834, Broadway, N. Y. aŭ National Organization of Polish Jews, 214 W. 92 St., New York, N. Y.

Sendube Esperantistoj en aliaj landoj, speciale Svedlando kaj Svislando interalie, ŝatus helpi pere de landaj Judaj Organizaĵoj, aŭ rekte se eble.

(El "*Amerika Esperantisto*")

DU SVEDAĴ ESPERANTO-PIO- NIROJ

PAUL NYLEN la 20an de Junio lasta fariĝis 75-jara. Jam antaŭ 50 jaroj li aktive partoprenis la svedan Esperanto-movadon kaj multe kunlaboradis kun Zamenhof. Dum duona jarcento li senlace kaj lerte laboris por Esperanto, kaj nur ĉijare, laŭ propra deziro, ekzigis kiel prezidanto de "Sveda Esperanto Federacio".

VALDEMAR LANGLET, alia sveda pioniro, nun 73-jara, fervore partoprenis svedan helakcion al Budapeŝto, kiam

TRIA ARGENTINA KON- GRESO DE ESPERANTO

Dum la du lastaj tagoj de Junio kaj la unua de Julio okazis en Rosario la Tria Argentina Kongreso de Esperanto, al kiu aliĝis Brazila Ligo Esperantista, Brazila Klubo Esperanto kaj kelkaj brazilaj esperantistoj. Al la estraro de la kongreso sendis gratulan telegramon la prezidanto de BLE.

Jen estas la ĉefaj decidoj de la Tria Kongreso:

1) — Dividi kun la samideanoj de Rosaria Esperanto-Asocio kelkajn taskojn de la Ligo. Ili prenos sur sin la gvidadon de la Konresponda Kurso.

2) — Principe aliĝi al Internacia Esperanto-Ligo, kun sidejo en Londono. Oni komisias la Ligan Komitaton tiu cele interrilatiĝi kun IEL. Findecidos la aliĝon la membraro de la Ligo per referendumo.

3) — Denove validigi la decidojn de la Jarkunveno de Mar del Plata pri normigo de kursoj kaj ekzamenoj por la kandidatoj al la diversaj diplomoj. Tiucele estas nomata komisiono al la jenaj samideanoj: Balech, Calógero, Hess kaj J. Scolnik.

4) — Prilabori la vortaron laŭ modelo de elementa vortaro jam eldonita Hispana-Esperante kaj inverse. Vortara komisiono konsistas el la jenaj S-noj: Balech, Corral, Goodes, Hess, Palacios, Scolnik kaj Vila Maynon.

5) — Entrepreni la eldonadon de "La Vivo de Zamenhof" de E. Privat, tradukite de S-no Calógero.

LA INTERNACIA ESPERANTO MUZEO

La "Internacia Esperanto-Muzeo" ekzistas. Nenio pereis pro la bomboj. La muzeo ekfunkcias ree ek de septembro 1945.

Por forigi la gravan mankon de Esperanto-lernolibroj, S-ro Steiner akiris permeson de la Ministerio de Instruado presigi: novan eldonon de sia lernolibro "Ĝojo per Esperanto" kaj germana-Esperanta ŝlosilo.

La aŭstria registaro jam donis permeson por la presigo kaj eldono de la "Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj" kiu ne povis aperi post 1938. La 1946a n-ro de tiu verko aperos en aprilo 1946.

(El "*Svisa Espero*", oktobro-novembro 1945).

la milito furiozis en la hungara ĉefurbo, kaj laŭdire per diplomacia laboro li savis la vivon de multaj homoj.

SEMAJNO ESPERANTISTA

Belo Horizonte, ŝtato Minas Gerais

(9 — 15 de Decembro)

Laŭ propono de D-ro Wilson Veado, delegito de IEL en Belo Horizonte, la "Esperanto-Klubo Azeredo Coutinho", kun la helpo de "Kristana Esperanto-Klubo", ĵus fondita, decidis festi la 86an Naskiĝan Datrevenon de Zamenhof per "Semajno Esperantista". La programo konsistis el kvar kunsidoj, el kiuj du en la festa salono de la "Blindula Instituto São Rafael", kies direktoro, Prof. José Donato da Fonseca, ĝentile cedis ĝiajn salonojn, kaj du ĉe la "Terokultura Societo de Minas Gerais". Dum la kunsidoj, kiujn ĉeestis grandnombro da geesperantistoj, interesuloj kaj reprezentantoj de aŭtoritatoj, oni paroladis, deklamis, kantis kaj ludis. La Esperantista Himno estis ĥore kantita ĉe la malfermo de ĉiuj kunsidoj kaj la fermo de la Semajno, ĉe kies malfermo S-ino Ignacia Pimentel fortepiane ludis la Brazilan Nacian Himnon.

Je la 15a tago, dum la ferma kunsido de la Semajno, la konata koncertisto Prof. Arnaldo Marchesotti, kiu estas blinda, ludis per fortepiano tiun ĉi himnon kaj alian muzikaĵon.

La saman tagon, je la 17a horo, grupo da esperantistoj vizitis la stacion de "Rádio Inconfidência", kiu apartenas al la ŝtata Registaro, kaj aŭdis la ĉi-sabatan dissendon de la Esperantista Programo en Esperanto, per mallongaj ondoj. D-ro Luiz de Azeredo Coutinho, prez. de la Klubo kaj de la Semajno Esperantista, faris paroladon pri la memorigata tago.

Dum la kunsidoj de la Semajno paroladis F-inoj Maria José kaj Lúcia de Azeredo Pena kaj S-roj A. Afonso Costa, Abílio Carvalho Campos, Cândido Ubaldino Gonzalez, Jarvis Vieira Campos, José Dias Vieira, Luís Anacleto Silos, D-ro Luiz de Azeredo Coutinho, Misael Alves Mendes, Oscar Dias Vieira, Walter Veado kaj Wilson Veado; deklamis F-inoj Clélia Taborda Galliac kaj Helena Kiss kaj la kvin-jara knabineto Cilene Costa kaj S-roj A. Afonso Costa kaj Luís Anacleto Silos. Kantis hispanan kanton F-ino Lúcia Veado. D-ro Aristóteles J. de Faria Alvim dankis la valoran helpon de la Blindula Instituto, la Centra Direktorio de Studentoj, la ŝtata Studenta Unuiĝo kaj la Terokultura Societo de Minas Gerais.

La gazetoj "Diário da Tarde" kaj "Folha da Manhã" aperigis detalajn informojn pri la festoj.

RADIO KAJ ESPERANTO

DIMANÇO — 09.30 — B. N. R. O.
Kortrijk (Belgujo). 205.5m. Parolado.

LUNDO — 20.20-30 — (G. M. T.)
— Praha 1 — (Ĉeĥoslovakujo) 1571
kaj 470.2m. Informoj politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj. Skribu al Radios, Stalinstr. 12. Praha XII.

MERKREDO — 18.00 (Orienta tempo). Sofio (Bulgarujo). Parolado.

ĴAŬDO — 20.20-30 — Praha 1. (kiel je lundo).

VENDREDO — 14.45 — WRJN Racine, Wisconsin, Usono. Parolado, muziko kaj kudso.

SABATO — 18.30 — 45 (nur je la dua sabato de ĉiu monato) 3 SR (Aŭstralio). 238m. Novaĵoj.

(El "Esperanto Internacia").

SABATO. 17.00 — 17.30 PRI-3 Ŝtata radistacio (Belo Horizonte — Brazilo). 49,75ms. 6.000 kilociklaj. Programo nur en Esperanto nomata "Brazila Kroniko". Skribu al: Radio Inconfidência — Belo Horizonte. Minas Gerais, Brazilo.

D-ro Wilson Veado, delegito de IEL en Belo Horizonte, je la 15a de Oktobro lasta, faris, en la nomo de la nacia kaj internacia Ligoj peton al la direktoro de la "Rádio Inconfidência", kiu apartenas al la Registaro el Ŝtato Minas Gerais, ke li permesu la stariĝon de duonhora dissendo per mallongaj ondoj de programo nur en Esperanto, kun la celo fari propagandon de la Ŝtato kaj ankaŭ de la tuta Brazilo. Li finis sian skriban peton per la jenaj vortoj: "Akceptante la proponon, kiun per mia pero, faras la nacia kaj internacia Ligoj, kiujn mi havas la honoron reprezentati, vi kontribuos elokvente kaj efike por la plej vasta kono eksterlande de la brazila vivo, pere de la ondoj de la radistacio, kiun vi tiel saĝe direktas, kaj kiu estas senfavore unu el la brazilaj centroj de kulturo de nia montara Ŝtato".

Tiu propono estas aprobitaj de la Sekretario de Terkulturo, al kiu estas subigata tiu radistacio, kiu deklaris, ke: "la programo proponita estas tre grava por la propagando de nia kultura, socia, scienca kaj turisma vivo".

Ĉe la tago de la inaŭguro de tiu programo, kiu okazis la 10an de Decembro kaj ricevis la nomon "Brazila Kroniko", D-ro Luiz de Azevedo Coutinho, Prezidanto de EKAC, faris saluton al la tutmonda esperantistaro. Poste kaj en la sekvintaj sabatoj oni disradiis paroladetojn, gazetajn artikolojn pri la brazila vivo kaj notojn pri la ĝenerala Esperanto-movado. Je

LA MALSAĜULO (*)

"Iŝmael, ho malsaĝulo!"
— Jen la eĥo de l' patrino,
Ĵen tagnoka vekriado
Senespera de l' edzino.

"Iŝmael, ho malsaĝulo!"
— Jen la maljunula kanto
De B.L.E. tra la gorĝo
De l' "Dumviva Prezidanto".

"Iŝmael, ho malsaĝulo!"
— Ĉiu klubo, ĉiu rondo,
Tuta domo, ĉiu karno,
Ĉiuj homoj, tuta mondo!

Sed "en sonĝo", dum la nokto
Iŝmael sin sentas sola...
For de l' mondo... kun "Spiritoj"...
Kaj... jen sonas voĉ' konsola:

"Iŝmael, ne ploru, frato,
Iŝmael, nekomprenito!
La malsaĝo ĉe la karno
Estas saĝo de l' spirito.

Iŝmael, ne ploru, frato!
Estas via l' avantaĝo:
Ĉar saĝeco antaŭ Dio
Estas tie ĉi malsaĝo."

J. J. H.

(*) Ismael Gomes Braga estas rigardata kiel malsaĝulo pro la pasia propagandado de Esperanto, kiun li faras ek de la knabeĝo, kaj tion rakontis al klera katolika pastro. Responde la sacerdoto skribis kiel leteron la suprajn versojn kaj menciis la jenajn vortojn de Sankta Paŭlo: "Ĉar la preparolo de la kruco estas por la pereantoj malsaĝeco; sed por ni, la savatoj, ĝi estas la potenco de Dio. Ĉar estas skribite: Mi pereigos la saĝecon de la saĝuloj, kaj la kompetentecon de la kompetentuloj Mi malaperigos. — Sed la natura homo ne akceptas la aferojn de la Spirito de Dio; ĉar ili estas por li malsaĝeco..." I. Kor. 1: 18-19, 2:14.

Ne penu eltrovi la landon, kie li loĝas, nek lian nomon, ĉar la supraĵ komenciteroj nenion diras al vi. Eble li iam eldonos libron kaj tie aperigos la versojn.

la 15a de Decembro estas disradiita specialan programon por memori la naskiĝan datrevenon de Zamenhof. La prezidanto de BLE sendis gratulan telegramon al la direktoro de "Rádio Inconfidência". Direktas la programon D-ro Wilson Veado, kiu petas per nia pero al ĉiu brazila Esperantisto, ke oni sendu al li materialon por la disradiado kaj leteron aŭ poŝtkarton al la direktoro de "Rádio Inconfidência".

La programo estas disradiata ĉiusabate, de la 17a ĝis la 17.30a, per mallongaj ondoj de 49.75ms kaj frekvenco de 6.000 kilocikloj.

NEKROLOGO

D-RO DOMINGOS BARBOSA

La 26an de Decembro lasta mortis en Rio de Janeiro, D-ro Domingos Barbosa, al kiu la Esperanto-movado en Brazilo multe ŝuldas. Li estis kooperamembro de "Brazila Ligo Esperantista". Advokato, eleganta verkisto, ĵurnalisto, poeto kaj politikisto, li estis federacia deputito, dufoje ĝenerala sekretario de la registaro de Ŝtato Maranhão, kie li naskiĝis kaj okupis diversajn oficojn, kaj lerneja inspektoro. Li apartenis al la Federacio de la Brazilaj Beletistikaj Akademioj kaj estis redaktoro de la grava "Journal do Brasil", kies artikoloj, sub la pseŭdonimo D. B., estis tre ŝatataj. Ĉiu venko de Esperanto estis motivo por unu el tiuj multlegataj artikoloj. Domingos Barbosa ankaŭ faris la paroladon ĉe la malferma solena kunsido de la Naŭa Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en la jaro 1936a. Li estis fervora katoliko kaj granda patrioto. La lastan fojon, kiam li eliris, estis por voĉdoni en balotado okazinta la duan de Decembro.

Li edziĝis dufoje kaj lasis vidvinon kaj kvin filojn, al kiuj Brazila Ligo Esperantista, en la nomo de la brazila esperantistaro, sendas sincerajn kondolencojn. Pacon al liaj cindroj!

PLENA VORTARO

S. A. T. planas reeldoni la Plenan Vortaron kaj vokas al ties uzantoj: "por ke la tria eldono superu la duan, konigu al ni la mankojn, la erarojn kaj la malklarojn, kiujn vi konstatis kaj sendu al S. A. T. — 67, av. Gambetta, Paris 20". Skribu sur unuflanko de la folio.

(El "Comprendre" — Aprilo — Junio 1945).

LIVROS EM E SOBRE ESPERANTO

PODEM SER ADQUIRIDOS NA

LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA

e nas seguintes livrarias:

Francisco Alves—Rua do Ouvidor, 166
Livraria da Boa Imprensa, Rua da
Assembléia, 35.

Livraria da Federação E. Brasileira —
Avenida Passos, 30.

PEÇAM CATÁLOGO

EKSKURSO AL JUIZ DE FORA

Je la 8a de Decembro lasta, karavano de geesperantistoj, organizita de la "Associação Esperantista do Rio de Janeiro", direktata de ĝia prezidanto, S-ro Délio Pereira de Souza, kaj de la Direktoro de l' Departamento de Ekskursoj, S-ro Antônio Varão, faris ekskurson al la urbo Juiz de Fora, el Ŝtato Minas Gerais, kiu estis la sidejo de la Kvara Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en la jaro 1911a. Ĝi konsistis el 9 geanoj de tiu asocio kaj kvar aninoj de "Esperanto-Klubo" de la "Kristana Asocio de Junuloj".

En Juiz de Fora ili estis akceptataj de S-ro Kapitano Jorge Firmino Santana kaj membroj de la Familio Saléh, geanoj de la Esperantista Klubo "São Jorge".

Je la 20a ili estas oficiale akceptitaj de la lokaj grupoj ĉe la Asocio de Komercoficistoj, kie paroladis pri Zamenhof nia samideano S-ro Vergílio Guai-anás de Sousa, kiu jam estis en Juiz de Fora kaj revenis kun la karavananoj.

Ili vizitis la lokan Radistacion, la Muzeon, la Fondaĵon João de Freitas, unu el la katolikaj preĝejoj, protestantan templon, la "Spiritan Doman" kaj la Kolegion Granbery, kie funkcias grupo filiita al BLE. Kiel rezultaton de la ekskurso, oni povas citi la vekigon de Grupo Esperantista "Abel Gomes", kiu estis dormanta. La karavananoj gastigis ĉe la "Magestic Hotel" kaj pasigis agrablajn horojn ĉe la Familio Saléh.

TIBOR SEKELJ

En sia aŭgusta numero "Argentina Esperantista", respondante al la demandoj de multaj samideanoj, informas, ke S-ro Tibor Sekelj, post la partopreno en la 10a Brazila Kongreso de Esperanto, decidis entrepreni ekspedicion al Ŝtato Mato Grosso.

Tie li vivas kontenta, en kabano konstruita el palmaj folioj, esplorante nekonatajn regionojn de Rio das Mortes, kie loĝas la indiĝenoj Chavantes.

LIBROJ EN ESPERANTO

Kun ĝojo la esperantistoj povas akiri denove la verkojn de D-ro Zamenhof, kiujn oni ne povis ricevi dum la milito, tial ni presigas tie ĉi la novan adreson de la eldonejo:

Esperantista Centra Librejo, 41 Rue Descartes, Paris V. Francujo.

Pri la novaj prezoj ni neniu povas informi, ĉar ili pligrandiĝas tre ofte.

EĤOJ DE LA DEKA KONGRESO

El la "Svisa Esperanto Societo" ni ricevis leteron, el kiu ni elĉerpis la jenon: "..... Kun granda plezuro ni ricevis vian tre valoran sendaĵon de libro kaj broŝuroj, eldonitaj okaze de la deka Brazila Kongreso de Esperanto, kaj elkore dankas vin pro via samideanea bela donaco.

"Estas ĉiam por ni granda kuraĝigo konstati kian bonan laboron faras via landa ligo. Ni miras pro la granda subteno kiun vi trovas ĉe via registaro kaj oficialaj sferoj. Malgraŭ niaj klopodoj en tiuj samaj rondoj de nia lando, ni ĝis nun ne ankoraŭ trovis tian aprobon kaj subtenon. Sed estas ja grave se jam en kelkaj landoj la registaroj sin interesas al nia verda afero. Iom post iom, la aliaj devos ankaŭ sekvi tiun vojon, ĉar la neceseco de internacia lingvo ĉiam pli efektive montriĝas. Vi havas la gloron esti ĉe la unua vico en tiuj venkoj kaj la oficiala apogo kiun vi ĝuas montras la viglecon de nia movado en via lando, kaj montras al la alilandaj movadoj je kiaj venkoj oni povas atingi per bonvolo kaj persistemo".

El la "Grupo Esperantista de La Chaux-de-Fonds" ni ankaŭ ricevis leteron, el kiu ni transskribas la jenon: ".... kaj ni miris pri viaj gratulindaj sukcesoj ĉe la diversaj Instancoj de via bela Regno. Ega ĝojo trafis nin pro tio, kaj ni ricevis tiel plian kuraĝon por propagandi nian idealon sur la propra kampo.

"La Membroj de nia Grupo tralegos viajn valorajn eldonaĵojn kun scivolemo, kaj certe plifirmigos la spiritajn ligojn, kiuj ekzistas inter ambaŭ naciaj Movadoj kaj inter niaj patrujoj".

El letero adresita al BLE de la Prez. de la "Nova Esperanto-Klubo St. Gallen":

"Per la adreso de la Svisa Esperanto Societo vi sendigis al ni pakajon da novaj eldonaĵoj de via Ligo, kiun ni bone ricevis. Antaŭ ĉio lasu nin danki al vi tre kore por la granda donaco. La du libroj: Brazilaj Tipoj kaj Santos Dumont iris al la bindisto, kiu liveris ilin nun bindite kaj formos specialan trezoron de nia grupa biblioteko. Precipe la unue citita verko estas tre valora. Ni deziras ke de tiu speco ekzistus eldonaĵoj de ĉiu lando. Ni ankaŭ dankas pro la pionira laboro sur la kampo esperantista, kiu helpas

Deka Brazila Kongreso de Esperanto

SPEZO

ENSPEZO

Kotizoj:

	Cr\$	Cr\$
Kontribuintaj mem- broj	9.026,30	
Esperantaj Grupoj ..	1.250,00	
Bonfarintaj Institucioj	13.000,00	
Kontribuintaj Institu- cioj	2.350,00	25.626,30
Postkartoj, Memorigfolioj, Ko- vertetoj kaj Poŝtmarkoj		6.688,40
Specialaj Kotizoj por la Eks- kurso al Petropolis		1.280,00
Oficiala Monhelpe por la Eldono de "Santos Dumont — La Aer- pioniro"		2.000,00
Bankaj Procentoj		313,60
		35.908,30

ELSPEZO

	Cr\$
Poŝtmarkoj kaj Telegramoj	1.122,30
Memorigaj Poŝtmarkoj pri la Kongreso	3.456,00
Presajfoj	3.313,00
Distingiloj	1.085,00
Ekspozicio	740,00
Filmo pri la Ekspozicio	2.100,00
Arta Festo en "Nacia Muziko- Lernejo"	2.260,00
Ekskurso al Petropolis	4.476,00
Koktelkunveno sur Monto "Urca"	2.800,00
Solena Kunsido	555,00
Promenado al Botanika Ĝardeno	225,00
Pagoj pro Servoj faritaj	3.375,00
Fotografajfoj	610,00
Libreto "Santos Dumont — La Aerpioniro"	2.868,50
Propagandilo "Esperanto"	1.000,00
Diversaj Elspezoj	1.713,10
Saldo transdonita Al B. L. E.	4.209,40
	35.908,30

Rio-de-Janeiro, la 7an de julio de 1945a.
—Délio Pereira de Souza — Kasisto.

al ni aliparte faciligi la propagandon kaj fierigi la kredon en la absoluta seriozeco de Esperanto en la publika opinio."

El "Svisa Espero", oficiala organo de "Svisa Esperanto-Societo": "Artikoloj pri la esperantobroŝuro pri Santos Dumont nun dissendata de la brazila ministerio por eksterlandaj aferoj aperis en: Eisenbahner, Bern, 7.9, Automobilrevue, Bern, 5.9, Bulach Bielsdorfer Volksfreund, 15.9, Wochenblatt, Pfaffikon, 15.9, Neue Zurcher Nachrichten, 18.9, der Morgen, Olten, 18.9, Basler Volksblatt, Basel, 18.9, National-Zeitung, Basel, 11.9, kaj 17.9 (dufoje!).

ESPERANTO E CATOLICISMO

Na enciclopédia católica *Lexikon für Theologie und Kirche*, editada pela própria Igreja, aprovada, etc. — 1931 — Herder — Freiburg im Breisgau — artigo “Esperanto”, lê-se: “Pio X, Bento XV e Pio XI abençoaram o movimento esperantista católico, muitos Cardeais e Bispos têm mostrado o seu interesse para com êle.” (O artigo é assinado por F. Lukas, pároco em Munique. A citação é do terceiro volume — *Coloratus bis Filioque*).

Na famosa revista católica jesuíta *Etudes*, 125 (1910) 684-690, acha-se um artigo elogioso a respeito do Esperanto, de Albert Condamin, jesuíta, grande professor de Exegese bíblica. Esse artigo é um comentário ao livro de G. Gautherot, o *Saulo do Esperantismo*. O Pe. A. Condamin termina assim: “Ser-me-á lícito acrescentar que os padres católicos têm uma razão a mais para aprenderem essa língua e desejar em difundir dela? Com efeito, ela pode colocá-los em relação fácil com fiéis no mundo inteiro, facilitar, em certos casos, o seu ministério e permitir-lhes estender a novos ouvintes o benefício das palavras da vida eterna.” O Pe. Condamin falava latim e deixou as suas obras escritas em latim.

Na mesma revista 157 (1918) 474-48°, outro jesuíta, célebre filólogo, he-lenista e latinista, especialista, fala muito favoravelmente acerca do Esperanto, pelo menos como língua internacional da ciência. Êle aí comenta a obra de Meillet, filólogo favorável ao Esperanto. De Meillet diz: “Ninguém na França — e porvavelmente no estrangeiro — conhece tantas línguas modernas e antigas quanto M. Meillet. Ninguém também estudou a linguagem de uma maneira mais científica nem refletiu tanto sobre os problemas gerais da lingüística.” Trata-se do Pe. L. Laurand, cujo nome nenhum estudante de filologia grega ou latina pode ignorar.

O Pe. Poulain escreve ainda naquela revista, 122 (1910) 839-844. Conquanto se mostre favorável ao Ido, a questão não se altera com relação àqueles que se opõem ao Esperanto com fundamento na artificialidade, na internacionalidade, etc.

PASTRO JOZEFO NOGUEIRA MACHADO, S. J.

En Brazilo elstariĝis en la lastaj tempoj brava batalanto por Esperanto en la tre grava kaj mondfama Kompanio de Jesuo, de la Romkatolika Eklezio. Laŭ la rezultatoj ĝis nun de li atingitaj ni rajtas esperi, ke lia konstanta agado havos mondinfluon en la triumfo de Esperanto ĉe la romkatolikaro.

Ĉiuj rekonas la grandan signifon de la jezuitoj en la instruado en ĉiuj landoj. En ĉiuj lokoj la jezuitoj havas grandajn kaj famajn kolegiojn por la instruado de la junularo kaj por formado de instruistoj. Ilia organizado estas vere mirinda kaj reprezentas unu el la plej fortaj mondorganizaĵoj de instruistoj ne nur por pastroj, sed ankaŭ por la formado de ĉiuspecaj profesoroj. Kvankam tre kontraŭatakata de malamikoj, la Kompanio de Jesuo prosperas tra la jarcentoj kaj gvidas la edukadon de multaj milionoj da inteligentaj homoj en ĉiu lando de la Okcidento.

La apogo de tiu Ordeno al nia afero estas tre valora. Bedaŭrinde, ĝis nun ni ne havis energian jezuiton en vigla laborado por Esperanto en la Ordeno. Nun tia gvidanto aperis kaj certe havos grandajn sukcesojn en sia laboro, ĉar li estas juna, klera, vigla, senlaca, varma propagandisto. Li komprenas tute klare la avantaĝojn de Esperanto por la Ordeno kaj por la romkatolika Eklezio, kiun li plej fidele servas, tial li ne ŝparas penojn nek tempon en sia apostolagado por Esperanto en kaj ekster la Ordeno.

Li propagandas per parolo kaj skribo, kuraĝigas, gvidas, helpas novulojn kaj senĉese agadas kaptante ĉiujn okazojn por servi al la afero kaj al sia Ordeno. En mallonga tempo li jam varbis dekojn da inteligentaj sacerdotoj kaj laikoj, jam posedas perfekte la lingvon kaj ĝin elegante uzas. Kie li aperas, oni nepre ekparolas pri Esperanto, ĉar li jam fariĝis simbolo pri la ideo de Esperantismo. Lia nomo estas Pastro Jozefo Nogueira Machado, S. J. (legu: Nogejra Maŝadu). En Esperanto *Nogueira* estas *Juglandarbo*, kaj tiu *arbo* vere donas dolĉajn kaj abundajn fruktojn jam nun en sia juneco por la kunfratiga afero de Esperanto. *Machado* estas en Esperanto *Hakilo*, kaj vere tiu hakilo plej fervore hakas la radikojn de ĉiuj antaŭjuĝoj kontraŭ la progreso de nia movado. La nomo, do, Nogueira-Machado, memorigas al portugallingvanoj la

PASTRO PETRO E. DE MELO, S. J.

En la 8a de Decembro 1945a sacerdotiĝis kaj faris sian unuan Meson nia samideano Pastro Petro E. de Melo, S. J., Colégio Cristo Rei, S. Leopoldo, Rio Grande do Sul, Brazilo. Li presigis specialajn memorajetojn por la Esperantistaro. Ili estas diversaj bildetoj pentritaj laŭ tekstoj de la Evangelio. Unu el la bildetoj montras la malserenon sur la lago, kiam Jesuo admonis la ventojn, laŭ la teksto de Sankta Mateo, ĉ. 8 par. 23; ĝi pensigos la kristanojn pri la vortoj de Jesuo: “Kial vi estas timemaj, ho malgrandfiduloj?”. La dua bildeto montras la Semiston, laŭ la teksto de Sankta Marko ĉ. 4 par. 3 ĝis 20; ĝi memorigos al la esperantistoj ankaŭ la poemeton de D-ro Zamenhof: “Ni semas kaj semas, neniam laciĝas, — Pri l' tempoj estontaj pensante. — Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, — Ni semas kaj semas konstante.”

Certe en sia apostolagado por Kristanismo, Pastro Melo trovos ĉiam okazojn por diskonigi la ideojn ankaŭ de Esperantismo, kiujn li sendube trovas tre parencaj de la instruoj religiaj. Dezirante al lia Pastra Moŝto plenan sukceson al lia apostolado, ni petas ke li preĝu por la afero, laŭ la ekzemplo de nia Majstro, kiu instruis al ni la vortojn:

“Donacu Vi benon al nia laboro,
Donacu Vi forton al nia fervoro,
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
Nin tenu kuraĝaj.”

La Ordeno al kiu apartenas Pastro Melo havas grandan influon en la edukado kaj instruado de la junularo en ĉiuj landoj, tial li povos fari grandajn servojn al “la afero, la plej bela sur la tero”, laŭ la klasifiko de lia kolego, nia karmemora Samideano Pastro Dombrowski, el Kaŭnas, Litovujo.

mision de tiu juna pastro: doni bonajn fruktojn kaj hakoj la antaŭjuĝojn.

Tiu jezuito naskiĝis en la Stato Ceará, Brazilo, en 1914, studadis sciencojn en Braga, Portugalujo, kaj nun faras teologiajn studojn por fina pastriĝo en Colégio Cristo Rei, S. Leopoldo, Rio Grande do Sul, Brazilo.

Nun Pastro Nogueira Machado preparas diversajn librojn kun la celo plirapidigi la progreson de Esperanto kaj samtempe propagandas, instruas, kuraĝigas la novulojn. Li ĉiam, ĉie, disradiadas entuziasmon kaj gojon pri la afero de Esperanto. Lia posedo de la lingvo estas perfekta kaj li senĉese ĝin uzas en prozo kaj versoj, kiel majstro de la idiomo.

**MAJSTRO EUCLIDES CARNEIRO,
S. J.**

Vojaĝante de Nova Friburgo al Baturité, Ceará, kie li de nun fariĝis instruisto de klasikaj lingvoj kaj literaturo, restis kelkajn tagojn en Rio de Janeiro la klera lingvisto kaj fervora esperantisto el la Kompanio de Jesuo, Majstro Euclides Carneiro, S. J., gvidanto de skoltisma movado.

En Rio de Janeiro li telefonis al S-ro Ismael Gomes Braga kaj lin invitis por vizito. Dum la vizito la du samideanoj diskutis diversajn temojn pri la propagando de Esperanto en la nova instruejo de Majstro Carneiro. En Baturité, kie la eminenta junulo instruados dum tri jaroj, jam ekzistas Esperanto-Movado, kiun li povos facile pligrandigi kaj prepari tie lertajn kursestrojn. Al li ni deziras grandan sukceson.

En la lastaj tempoj la Esperanto-Movado trovis fervorajn batalantojn ĉe la kleraj profesoroj el la Ordeno de la Jezuitoj. Ĉefe, junaj jezuitoj ricevas kun entuziasmo la lingvon kaj ties konsekvencojn por la apostolagado de la kristanoj, kaj fervore laboras en la propagando. Majstro Euclides Carneiro scias multajn modernajn kaj klasikajn lingvojn ne nur el Okcidento, sed ankaŭ la japanan el Oriento; tial li neniam uzis vortaron en la lernado de Esperanto: ĉiujn radikojn li jam konis el aliaj lingvoj.

LA ĈE INSTITUTO DUM LA MILITO

Jus rekomenciĝis la poŝta servo al la eksterlando. Mi rapidas uzi ĉi tiun unuan okazon por kore saluti niajn ĉiulandajn samideanojn kaj kunlaborantojn, kaj doni al ili kelkajn informojn pri la sorto de nia instituto.

Post la eksplodo de la milito, en Septembro 1939, la nederlanda registro postulis la domon de nia Instituto en Riow-strato 172, por loĝigi en ĝi iun regnan oficejon. Tiam la familio Isbrücker kaj la Instituto kune luis grandan domon en la proksimeco de la marbordo, kaj ni daŭrigis niajn laborojn, kvankam en pli malgranda skalo, ĝis la germana invado en majo 1940.

Konante la persekutadon de Esperanto en Germanujo, post la okupo de Nederlando ni intencis savi la Instituton kaj ĝiajn posedaĵojn per formala likvido, sed tio ne estis ebla, ĉar la Instituto estis laŭleĝa fondaĵo kun jura persono, kaj tial laŭ la nederlanda leĝo ne dissolvebla. Aliflanke la germanaj aŭtoritatoj ripete akcentadis, ke ili venis al Nederlando nur kiel amikoj kaj protektantoj, por defendi la neŭtralecon de Nederlando, kaj ke ili tute ne intencas fari ĉian ŝanĝon en la vivo de la nederlanda popolo.

Efektive, en la komenco oni ne ĝenis nian movadon; eĉ oni permesis uzi Esperanton en la korespondado kun la neutrala eksterlando, kaj la poŝtoŭicejoj en Germanujo daŭrigis akceptadi abonojn por LA PRAKTIKO. Tial, post kelkmonata paŭzo, en la aŭtuno de 1940 ni rekomencis la publikigadon de LA PRAKTIKO, kaj ni havis en

ENKONDUKO

La Brazila Spiritisma Federacio, kies laboradon por Esperanto ni jam plurfoje menciis en "O Brasil Esperantista", ĵus eldonis samtempe du Esperantaĵojn, unu por la tuta publiko — Primeiro Manual de Esperanto — pri kiu ni raportas aliloke en nacia lingvo, kaj la alia por lernantoj de Spiritismo, kiun ni recenzas tie ĉi.

"Enkonduko en la Studadon de la Spiritisma Doktrino", de Allan Kardec, en bonega traduko de P. C. N., estas kvardek-paĝa libreto formita el la unua parto de alia pli granda libro baldaŭ aperonta en Esperantujo. En tiuj 40 paĝoj la fama spiritista verkisto defendas Spiritismon kaj respondas la ĉefajn kontraŭajn opiniojn de siaj samtempoj. La unua franca eldono aperis en la jaro 1875a, do la lingvo jam estas klasika por la spiritistoj, sed supeble ne ankoraŭ konata de la plej multaj esperantistoj tra la mondo. Neniel kritikante la ideojn de la Aŭtoro, kiujn ni ne aprobas nek malaprobas en nia neŭtrala movado, ni ĝojas ke nia literaturo estas pliriĉigita de nova libro, kiu certe okezigos interesajn kaj varmajn diskutojn. Inteligentaj diskutoj pri doktrinoj estas ĉiam tre dezirindaj, ĉar ili pliriĉigas la literaturon de la homaro kaj progresigas la homojn. Ja, se ni ĉiuj havus la samajn pensojn, la samajn konvinkojn, ni malprogresus, ĉar ni jam ne bezonus paroli nek skribi por eldiri niajn pensojn, ni povus resti ĉiam en silento kaj iom post ni forgesus la artojn paroli kaj skribi. El la malsameco de la ideoj, sekve, venas nia intelekta riĉiĝo kaj progresado. Honesta diskutado estas tre bona kaj se tiu nova libro okazigos diskutojn kaj aperigos aliajn librojn, ĝi estos tre utila.

la oficejo de la Instituto ĉiusemajne bone vizitata kunvenon por la studado de la historio de la Esperanto-movado.

Sed la 20an de marto 1941 surprize aperis en la oficejo de la Instituto du policistoj, kaj je la ordo de la germanaj regantoj ili fermis la Instituton kaj konfiskis ĝian tutan havaĵon. Per du grandaj transport-aŭtomobiloj oni forportis la oficejajn meblojn kaj maŝinojn, la tutan arkivon kaj la stokon de niaj eldonaĵoj. La policistoj iris de nia oficejo al la presejo, kie oni ĝuste komencis la presadon de du numeroj (marto kaj aprilo 1941) de LA PRAKTIKO. Ili haltigis la laboron kaj disrompis la kompostaĵojn.

En la aŭtuno de 1941 la librojn kaj aliajn eldonaĵojn de la Instituto, kune kun la tuta arkivo kaj administracia papermateriale, oni transportis al iu paperfabriko. Miloj da klišoj, insignoj k. t. p. havis similan sorton. Sed tamen en la lasta momento, kiam la disŝirado de la libroj estis jam komencita, per la helpo de bonvolaj

**PRIMEIRO MANUAL
DE ESPERANTO**

Com melhor apresentação e expurgada de muitos erros tipográficos que enfiavam as anteriores, acaba de aparecer a quarta edição brasileira da famosa "Brochura Vermelha" de Hachette.

Esse interessante opúsculo de propaganda foi elaborado pelo Professor Carlo Bourlet há mais de quarenta anos e a pouco e pouco tornou-se o livrinho preferido pelos propogandistas de Esperanto em todo o mundo, quer em traduções para outras línguas, quer em imitações mais ou menos perfeitas.

As edições brasileiras divulgadas pela Livraria da Federação são acrescentadas de chaves dos exercícios, de sorte a servirem aos autodidatas e aos novos professores com pouco conhecimento do idioma.

Afim de facilitar o trabalho dos professores e propogandistas, a Editôra lhes concede um abatimento de 50%, desde que comprem cinco ou mais exemplares diretamente de sua Livraria. Assim, apesar do grande encarecimento dos preços de todos os livros, o Primeiro Manual de Esperanto continua ao alcance de tôdas as bôlsas e, como contraste de preços, traz um anúncio do compêndio de Esperanto mais caro que existe no planeta: o Universal Esperanto-Metodo, do Dr. William Benson, que é vendido nos Estados Unidos por quatro dolares e aqui no Brasil por Cr\$ 80,00. Foi bem inspirado esse anúncio, porque as pessoas que possam comprar o enorme volume de Benson, depois de estudar o Primeiro Manual de Esperanto, farão por aquêle um curso de aperfeiçoamento muito profundo e agradável.

policistoj ni sukcesis savi de la pereco malgrandan kvanton de libroj kaj aliaj esperantaĵoj. Alia ne granda kvanto de libroj saviĝis tiel, ke ĝi restis ĉe la bindisto, nerimarkate de la germanaj vandaloj.

Bedaŭrinde multaj el niaj amikoj kaj kunlaborantoj ne atingis la liberigon. Plurajn, inter ili nian konatan propogandiston S-ron Glück, englutis la germana buĉmaŝino. S-ro Pragano saviĝis, forkurante el la mano de la polico.

La familio Isbrücker, kaj ankaŭ mi mem, feliĉe, restis sufiĉe sanaj kaj anime fortaj. Ni perdis kvin belajn jarojn el nia vivo, sed ni ne perdis nian optimismon kaj kuragon. Ni komencis rekonstrui ĉion, kio detruigis, kaj decidis fari pli multe kaj pli bone, ol antaŭ ĉi tiu kruela kaj abomena, sed ankaŭ instrurica milito.

Hago, la 16an de junio 1945
Andreo Uscă

EKZERCARO DE D-RO ZAMENHOF

31a ekzerco

SANO — saŭde
 SANA — sã, bom (*de saŭde*)
 SANE — com saŭde, sãmente
 SANI — estar sã, estar bom (*de saŭde*)
 SANU — esteja sã
 SANIGA — saudável, salutar, salubre, sanitário, curativo, higiênico
 SANECO — estado sanitário, estado de saŭde, sanidade
 SANILO — meio de conservação da saŭde (*exercícios, ar fresco, higiene, etc.*)
 SANIGI — sanear, sanar, curar
 SANIGI — curar-se, sarar
 SANEJO — casa de saŭde
 SANISTO — higienista
 SANULO — uma pessoa sã, válido (*um*)
 MALSANO — doença, enfermidade, moléstia
 MALSANA — doente, enfêrmo
 MALSANE — com doença
 MALSANI — estar doente
 MALSANULO — doente (*um*)
 MALSANIGA — insalubre, doentio
 MALSANIGI — adoecer, enfermar, ficar doente
 MALSANETA — indisposto, incomodado
 MALSENEMA — doentio, achacado, enfermigo

MALSANULEJO — hospital
 MALSANULISTO — enfermeiro
 MALSANERO — sintoma
 MALSANERARO — doença
 SANIGEBLA — saneável, sanável
 SANIGISTO — higienista
 SANIGILO — remédio, aparelho sanitário
 RESANIGI — sanar, curar
 RESANIGANTO — convalescente
 SANIGILEJO — farmácia, casa de aparelhos sanitários
 SANIGEJO — sanatório
 MALSANEMULO — uma pessoa enfermiga
 SANILARO — caixa de remédios, botica
 MALSANARO — doenças
 MALSANULIDO — filho de doente
 NESANA — indisposto
 MALSANADO — doença prolongada
 SANILAJO — V. SANILO
 MALSANECO — doença, morbidez, achaque
 MALSANEMECO — estado mórbido
 SANIGINDA — que merece ser curado, saneado
 SAN(IG)ILUJO — caixa de remédios, botica
 REMALSAN(IG)O — recaída
 MALSANULINO — doente (*umã*)
 SAN(IG)ILISTA — higiênico
 MALSANULISTA — de médico

KLASIKAJ LIBROJ SAVITAJ

Dum ses jaroj ni ricevis nenian informon pri la libroj eldonitaj en Parizo kaj logike ni timis, ke ili estus detruitaj de la invadintoj, same kiel okazis en Polujo kaj Nederlando. En ĉi tiuj landoj, laŭ artikolo de Pastro Andreo Ĉe, la libroj en Esperanto estis ĉiuj detruitaj por fabriki el ili novan paperon. Nu, en Parizo estis la tuta provizo de klasikaj libroj de D-ro Zamenhof, Kabe, Grabowski k. a., kies detruado estus granda perdo por ni ĉiuj, ĉar en la malfacila ekonomia stato post la milito oni ne povus represi tiujn plurajn librojn kaj la novaj esperantistoj restus sen ili dum jardekoj.

Nun ni povas trankviliĝi. La tuta provizo estas konservita kaj jam alvenis al Brazilo ekzempleroj de "Fundamenta Krestomatio" eldonita en 1939 kaj ĉiuj aliaj klasikaj libroj presitaj antaŭ la milito. Al niaj parizaj samideanoj ni ŝuldas dankon, ĉar ili sukcesis kaŝi tiun trezoron for de la okuloj de la invadintoj por konservi ĝin al la civilizita mondo post la longa okupado de Parizo. Jen la nova adreso de la Centra Esperantista Librejo, el kiu oni povas mendi tiujn klasikaĵojn 41 Rue Descartes, Paris-V-Francojo.

Laŭ la lasta prezlisto, kiun ni ricevis, la prezoj estis plialtigitaj 300%, kaj eble oni jam denove plialtigis ilin, ĉar la absoluta manko de papero en Eŭropo igis ĉiujn librojn tre multekostaj. Pro la tre altaj prezoj, ne ĉiuj povas nun akiri tiujn librojn, sed almenaŭ niaj societoj havos ilin por siaj membroj en komuna biblioteko. Brazila Klubo "Esperanto" klopodas por organizi specialan bibliotekon por pruntedoni librojn tra la tuta lando al esperantistoj kiuj ne povas mem posedi nun bibliotekon pro la altaj prezoj de la libroj. Tia pruntbiblioteko estos granda servo al niaj samideanoj loĝantaj en malgrandaj urboj, kie ne ekzistas Esperantaj libroj. Ĉiu el ni ne povas posedi grandan bibliotekon, sed ni ĉiuj kune povos aĉeti ĉiujn ekzistantajn librojn kaj ilin legi unu post alia.

Por informoj pri la organizado de tiu Pruntbiblioteko, oni povas skribi al Fraŭlino Débora Amaral Malheiro, ĉe Brazila Klubo "Esperanto", Praça da República n.º 54 sob., Rio de Janeiro.

Tiu pruntbiblioteko estos gvidata de la prezidanto mem de B. K. E., S-ro Caetano Coutinho, kiu estas granda spertulo pri la Esperanta literaturo. Sekve, niaj samideanoj ne timu la altajn prezojn de la libroj, ĉar el ĉiu malbono venas io bona.

IMITINDA EKZEMPLO

Ni legas en la gazeto "O Vieirense", de la lernantoj de la fama Kolegio "Antônio Vieira", en Salvador, Bahia, ke la junuloj tie fondis Esperantistan Centron por la instruado de la lingvo. Ne estas instruisto, sed tio ne gravas, ĉar en ĉiu semajno unu el la lernantoj gvidas la kurson. Li lernu el libroj kaj instru! Samtempe ĉiu lernas kaj instruas.

La gvidanto de la Centro kaj ties prezidanto estas S-ro Petro Benjamin Vieira. La Vicprezidanto estas S-ro Ludoviko Fontenelle, Sekretario — S-ro Paŭlo Morais. Kasisto kaj Bibliotekisto ne estas ankoraŭ necesaj.

Tia ekzemplo estas imitinda, ĉar tre ofte oni deziras sed ne malfermas kurson pro manko de instruisto; nu, se memlernanto tre facile kaj rapide akiras la lingvon, kial pluraj memlernantoj, helpante unuj aliajn, ne povus

sukcesplene fari tutan kurson? Laŭ instruo de la Evangelio, la Fondinto de Kristanismo diris: "Kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili" (Mat. 18:20). Simile ni povas diri: "Kie du aŭ tri kunvenas por Esperanto, tie estas laboro de la esperantoj".

Antaŭen!

Karlo, de Edmond Privat

Facila legolibro por la lernado de Esperanto

Eldono de Brazila Ligo Esperantista — Praça da República, 54.

Rio de Janeiro

Prezo: Cr\$ 3,00

Speciala prezo por grupoj:

12 ekzempleroj — Cr\$ 30,00

25 " — Cr\$ 50,00

BRAZILA KRONIKO

RIO GRANDE DO NORTE. — *Natal*. Je la 8a de Novembro okazis ĝenerala kunsido de "Esperanta Asocio de Rio Grande do Norte", dum kiu oni elektis la jenan estraron: "Prez. — S-ro Apeles Lemos, sek. — S-ro David Starec, kas. — S-ro Vicente Ferreira do Rego kaj direktoro de kulturo — S-ro João Fernandes Carvalho. Funkcias kurso ĉe ĝia sidejo. Dum la nuna jaro aperis artikoloj kaj notoj pri Esperanto sur la jenaj gazetoj: "A Repú-

en la ĉielo" pri la kvina datreveno de la morto de Odilon Vidal de Araújo, kies portreto ilustras la artikolon. Ĝi publikigis ankaŭ recenzon pri la *Vortaro Esp.* — Portugala, artikolon de S-ro Guaianás de Sousa, leteron el Rio, la kutiman Fakon "O que é o mundo esperantista? kaj artikolon de S-ro Mário Rodrigues Monteiro titolitan "Gibran, filozofo, poeto kaj pentristo". Baldaŭ eliros alia numero memoriga de la sesa datreveno de ĝia apero.

de Esperanto por la internacia interkorespondado.

En la fama Kolegio "Antônio Vieira" kelkaj lernantoj fondis esperantistan Centron, kies estraro konsistas el la jenaj junuloj: Prez. — S-ro Petro B. Vieira, vicprez. — S-ro Ludoviko Fontenelle kaj sek. — S-ro Paulo Morais.

ŜTATO RIO DE JANEIRO. — *Barra Mansa*. Estas aprobita kun distingo en sia elementa ekzameno per korespondado kaj ricevis la Ateston pri Lernado F-ino Lacyr Schettino. Daŭras la kurso, kiun ŝi direktas.

Petrópolis. Jen estas la adreso de la nuna sidejo de "Petropolisa Esperanta Grupo": Rua Alencar Lima, 42.

Campos. Aliĝis al niaj Ligoj kiel MJ S-ro Renato de Abreu, kiu partoprenis kurson de Esperanto en la sidejo de Brazila Klubo "Esperanto".

SÃO PAULO. — *São Paulo*. Aliĝis al niaj Ligoj novaj anoj de "São Paulo Esperanta Klubo".

En sia nova sidejo, ĉe salono de la lernejo "Kurso João Kopke", sur strato São Bento, 69 — unua etaĝo, la Klubo okazigis ĝeneralan kunsidon, al kiu prezentis detalan raporton ĝia prezidanto, S-ro Osvaldo Leite de Morais.

El tiu raporto ni elĉerpis la jenan ĉapitron pri Kursoj de Esperanto: "Ses elementaj kaj du superaj kursoj estis malfermitaj ekde la dua jarduono lasta ĝis la nuna monato de Novembro. El la ses inaŭguritaj kursoj tri jam estas finitaj kaj tri ankoraŭ funkcias sub la direktado de D-ro Geraldo de Azevedo, D-rino Azália Machado Dias kaj F-ino Amélia Levy. La tri aliaj estis direktitaj de S-roj Otto Kühne, Osvaldo Leite de Morais kaj René Ventura Sales. La du superaj kursoj



Fotografajo farita je la 10a de Aŭgusto nunjara okaze de la inaŭguro de nova elementa kurso de Esperanto direktata de D-ro Geraldo de Azevedo, ĉe la sidejo de "S. Paulo Esperanta Klubo".

blica, "O Diário" kaj "A Ordem", el kiuj ni reliefigas la artikolon de D-ro Luiz da Câmara Cascudo pri la Deko Kongreso.

Santa Cruz. La semo disjetita de S-ro Arlindo Castor de Lima sur tiun urbon trovis bonegan teron. Je la 26a de Septembro lasta, sub la aŭspicioj de "Esp. Asocio de Rio Grande do Norte", fondiĝis "Grupo Esperantista Odilon de Azevedo", honore de tiu ĉi neforgesebla samideano. Jen ĝia estraro: "Prez. — Prof. Raimundo Soares, unua, sek. — S-ro Cícero Pinto Nunes, dua sek. — S-ro Severino Pessoa Cavalcanti, kas. — S-ro Manoel Soares kaj bibl. — S-ro Manoel Macedo de Oliveira. Estas ankaŭ elektita Honora Komitato, konsistanta el la jenaj personoj: F-ino Marluce Fiuza, Pastro Alair Fernandes Vilar, D-ro Dario Jordão de Andrade kaj S-ro Alfredo Xavier Bezerra. Ĝi funkcias ĉe la Lerneja Grupo Quintino Bocaiuva. Ni esperas, ke la nova grupo, kies entuziasmo por Esperanto certe ne malfortigos, aliĝos al BLE.

PERNAMBUCO. — *Recife*. Aperis la Junia-Julia numero de "Pernambuco Esperantista", kiu publikigis sur la unua paĝo artikolon de S-ro Aldino de Freitas titolitan "Patro nia, kiu estas

La Asocio preparas ekspozicion starigotan ĉe la sidejo de la Sindikato de la Komercoficistoj. Sub la titolo "La opinio de la leganto" la grava gazeto "Jornal do Comércio" aperigis du interesajn artikolojn de S-ro Moacir S. Cunha.

BAHIA. — *Salvador*. D-ro Jaddo Couto Maciel prezentis al la Unua Kunveno de la Radiamatoroj, okazinta en Rio de Janeiro en la monato Aŭgusto nunjara, sugestion pri la uzado



Fotografajo farita je la 11a de Aŭgusto nunjara okaze de la inaŭguro de nova kurso de Esperanto direktata de D-rino Azália Machado Dias, ĉe la sidejo de "S. Paulo Esperanta Klubo".

ankoraŭ funkciantaj, estas direktataj de S-roj Osvaldo Leite de Moraes kaj René V. Sales.

“Laŭ la Regularo por Ekzamenoj de Esperanto, ĉiu aprobita lernanto de la elementaj kursoj ricevos de Brazila Ligo Esperantista Ateston pri Lernado kaj tiuj de la superaj ricevos la diplomon de Profesoro Aprobita. Jam ricevis Ateston pri Lernado 43 gelerintoj de la elementaj kursoj kaj preskaŭ ĉiuj ĉeestas nun la superajn kursojn”.

La “Brazila Genealogia Revuo”, kies ĉefredaktoro estas nia samideano Kolonelo Salvador de Moya, en sia nunjara numero publikigis bonegan arti-

Santos. Jen estas la nova estraro de “Centro Esperantista de Santos”: Prez. — S-ro Lauro Jorge de Oliveira, sek. — S-ro Leonel Bogéa Nogueira da Cruz, kas. — S-ro Manoel Pontes Filho, bibl. — S-ro Francisco Corrêa de Melo kaj membroj de la Kontrola kaj Decida Komitato — S-ino Ana Maria R. T. Mundel kaj S-roj Luiz Gomes Cruz, Luiz Fernandes Carranca, Vital Passos de Melo kaj Alexandre Alves Peixoto. Ĉiuj estas instruistoj.

SANTA CATARINA. — *Florianópolis.* Je la 7a de Decembro okazis ekzamenoj de sep gelerintoj de la kurso, kiun direktis S-ro Giovanni Fa-

lotizon por la jaro 1946a la malnovaj anoj S-roj kolonelo Felisberto do Amaral Peixoto kaj D-ro Ildefonso da Silva Dias, ĉiuj anoj de “Esperanto-Grupo Zamenhof”, kies sidejo estas sur strato General Vitorino, 146.

“Esperantista Societo de Pôrto Alegre”, antaŭe “Sociedade Esperantista Sul-riograndense”, aliĝis al BLE pere de la jenaj malnovaj anoj: S-roj Ary Zamora, Boris Eston, Lysippo José Rodrigues kaj José Martins kaj de la novaj: S-roj Alois Furtenbach (MA), Jonathas de Campos Jacini, Alberto Sieber kaj Darcy Zamora (AM). Jen estas la adreso de la nova aliĝinta asocio: Rua S. Carlos 1192.

Okaze de la naskiĝa datreveno de Zamenhof ĝia estraro kunvenis ĉe Kafejo Roxi por ĝin festeti kaj S-ro Eston Boris faris memorigan saluton.

Jam revenis al Pôrto Alegre, post ilia longa restado en Rio de Janeiro, nia fervora samideano D-ro Benjamin Camozato kaj ties edzino S-ino Acidália Camozato. Li estas elektita membro de la Decida Konsilantaro de la “Brazila Filatela Klubo”, kun sidejo en Rio de Janeiro.

Vila Torquato Severo. Je la 20a de Septembro lasta okazis ĝenerala kunido de “Esperanto-Rondeto de Torquato Severo”, dum kiu oni elektis ĝian novan estraron, konsistantan el la jenaj personoj: S-roj Edú Severo — prez., Carlos S. Pereira — vicprez., Paulo Guilherme Neto — sek., Policarpo Severo — kas., kaj Oscar Severo — bibliotekisto. D-ro João Severo, delegito de IEL, instalas sian delegitecon en la sidejo de la Rondeto.

Pelotas. Je la 8a kaj 9a de Decembro okazis, respektive, la sacerdotiĝo kaj la uŭua meso de Pastro Pedro E. de Melo, S. J., nia fervora samideano, el la “Kolegio Kristo-Reĝo”, kun sidejo en urbo São Leopoldo. Kiel memoraĵon pri sia sacerdotiĝo li sendis al BLE sanktan bildon. Dankon kaj gratulon!

MINAS GERAIS. — *Belo Horizonte.* Plifortiĝas ĉiutage la Esperanto-movado en la ĉefurbo de ŝtato Minas Gerais. Ĉiumarde kunvenas la “Esperanto-Klubo Azeredo Coutinho”, kies kunvena programo konsistas el: “Konversacia praktiko, legado de pecoj de verkoj de Zamenhof kaj paroladetoj en kaj pri Esperanto”. Je la 6a de Oktobro la geanoj de tiu klubo, akompanataj de ĝia prezidanto, D-ro Luiz de Azeredo Coutinho, faris viziton al la kurso de Esperanto, kiu funkcias ĉe salono de la Metodista Preĝejo. Ili estas akceptitaj de S-roj Dilermando Teixeira, kursestro, kaj Alan Kardec Afonso Costa, lia helpanto. Estas or-



Fotografajo farita je la 18a de Aŭgusto nunjara okaze de la inaŭguro de nova elementa kurso de Esperanto direktata de F-ino Amélia Levy, ĉe la sidejo de “S. Paulo Esperanta Klubo”.

kolon pri Esperanto kun la portreto de Zamenhof kaj fotografajoj de lecionoj de Esperanto kaj kolekto da esperantaj gazetoj. La revuo estas eldonata de la “Brazila Genealogia Instituto”, kiu aliĝis al nia Dekka Kongreso.

Okaze de la naskiĝa datreveno de Zamenhof la gravaj ĵurnaloj “Diário de S. Paulo”, “Estado de S. Paulo”, “A Noite”, “Jornal de São Paulo”, publikigis longan artikolon pri la vivo de la kreinto de Esperanto kaj “A Folha da Manhã” aperigis intervjumon kun S-ro Osvaldo Leite de Moraes, prezidanto de “S. Paulo Esperanta Klubo”.

Je la 24a de Decembro la estraro de SPEK faris gratulan viziton al S-ro Ambadoro José Carlos de Macedo Soares pro lia elekto kiel regdelegito.

En la komenco de Januaro la Klubo transloĝigos sian sidejon al la Avenida São João, 126 — s-loja.

Aliĝis ankaŭ al niaj Ligoj, kiel MA S-ro prof. Osvaldo Arruda Stein, el *Cravinhos*; kiel MJ S-ro Manoel Mendes de Queiroz, el *Ribeirão Preto*, kaj kiel AM S-ro Astério Braga, el *Taubaté*.

raco, prez. de la tiea klubo. Ĉiuj estas aprobitaj kaj ricevis la Ateston pri Lernado. “Diário Oficial do Estado de Santa Catarina”, oficiala organo de la ŝtata Registaro, publikigis la rezolucion pri Esperanto aprobitan de la Regiona Kunagantaro de la Nacia Konsilantaro de Statistikisto.

S-ro Francisco Carlos Regis, instruisto ĉe Colégio Catarinense, alparolis al sia lernantaro pri Esperanto kaj al ili sciigis, ke li en la jaro 1930a estis ano de Gimnazia Rondeto. Laŭ peto de kelkaj liaj lernantoj, S-ro G. Faraco intencas malfermi kurson de Esperanto ĉe tiu Kolegio.

Jam aperis la 4a numero de la Kluba Bulteno, kies estontaj numeroj eble aperos presitaj. S-ro G. Faraco verkas libron por la konkurso malfermita de IEL, kiun li nomis “Romaneto en Brazila ĉefurbo”. Ĝi temas pri la vizito, kiun faris al tiu ĉi urbo La Perouse en la jaro 1785a.

RIO GRANDE DO SUL. — *Pôrto Alegre.* Aliĝis al niaj Ligoj kiel AM S-roj Clodomiro Garcia, Subkolonelo Rodolfo Lemos de Melo kaj Adolfo Rodrigues de Amorim kaj jam pagis sian

ganizita programo, kiu konsistis el la Esperantista Himno, dufoje kantita de la Ĥoro de la Kristana Lernejo, la poezio "Ho! Mia kor'", deklamita de kvinjara knabineto, filino de la instruisto, kaj paroladetoj faritaj de tiu ĉi, de ties helpanto, de D-ro Luiz Coutinho kaj de S-ro Wilson Veado, delegito de IEL kaj BLE. Oni regalis la vizitantojn per dolĉaĵoj kaj senalkoholaj trinkaĵoj.

Kiel rezultato de vizito de D-roj Luiz A. Coutinho kaj Wilson Veado al S-ro prof. José Donato da Fonseca, direktoro de Instituto São Rafael, por blinduloj, estas decidita la malfermo de kurso de Esperanto ĉe tiu blindulejo en la monato Marto 1946a, kiun ankaŭ ĉeestos la nunaj lernantoj de la kurso ĉe la Blindula Asocio "Luis Braille", direktata de S-ro Wilson Veado.

S-ro Luis Anacleto Silos daŭrigas sian kurson ĉe spiritisma societo.

La 4a Ŝtata Konsilantaro de Studentoj, kunveninta en Belo Horizonte, dum la monato Oktobro, aprobis rezolucion favoran al Esperanto, rekomendantan al la studentaro ĝian lernadon kaj apogon al ĝia propagando.

Grandan sukceson havis la festoj okazintaj dum la "Esperantista Semajno", organizitaj de "Esperanto-Klubo Azeredo Coutinho" por memorigi la naskiĝan datrevenon de D-ro L. L. Zamenhof, pri kiu ni parolas detale aliloke.

Granda venko de la Esperanto-movado en Belo Horizonte estas la starigo de ĉiusabata radi-dissendo en Esperanto dum horduono de programo nomata "Brazila Kroniko" per mallongaj ondoj (49.75 ms.), pere de la oficiala stacio de "Rádio Inconfidência" PRI-3. Oni petas al ĉiu, kiu aŭdis tiun ĉi programon, ke li sendu gratulan leteron aŭ poŝtkarton al la "Direktoro de Rádio Inconfidência". *Belo Horizonte. Minas Gerais.* Estas dezirindaj artikoloj en Esperanto pri ĝenerala intereso aŭ loka Esperanto-movado.

La prez. de "Esperanto-Klubo Azeredo Coutinho" nomis Finon Maria do Amaral Malheiro ties reprezentanton ĉe la kunsidoj de BLE.

MATO GROSSO. — *Campo Grande.* Je la 23a de Oktobro lasta, ĉe la sidejo de Spiritisma Centro "Disĉiploj de Jesuo", kunvenis kelkaj amikoj de Esperanto, sub la direkto de D-ro Hermínio Pereira Mendes, prez. de l' Centro, kaj fondis esperantistan grupon, kiu ricevis la nomon "Campo Grande Espe-

ranta Klubo". Jen ĝia unua estraro: Direktoro — S-ro Eliseu Cesco, sek. — S-ro Heitor Varela da Costa e Faria kaj kas. — S-ino Josefina Pitthan. Oni sendu la korespondataĵojn al: Rua Ruy Barbosa, 461. Tiu frukto ŝuldiĝas al la semo tien ĵetita de nia fervora samideano S-ro Onésimo Faria, kies resaniĝon ni ĉiuj varme deziras.

En salono de la "Lernejo Álvaro Martins Neto", ĝentile cedita de ĝia direktoro, S-ro Manoel Garcia de Souza, funkcias kurso de Esperanto.

RIO DE JANEIRO. — Brazila Klubo "Esperanto" daŭrigis la reorganizado de sia valora biblioteko, kiun nun direktas Fino Débora do Amaral Malheiro. Finiĝis la elementa kurso, kiun malfermis en ĝia sidejo dum la monato Junio nunjara Fino Maria do Amaral Malheiro. Pri la rezultato de la ekzamenoj ni parolas aliloke. Okaze de la disdonado de l' Atestoj parolis Fino Célia da Silveira Muniz, kiu donacis al la instruintino, en la nomo de la ĝelernantoj, artan vazon.

La "Associação Esperantista do Rio de Janeiro" daŭrigis sian viglan laboron per kunsidoj, kursoj, ekskursoj ke. Okazis ekzamenoj de la elementaj kursoj direktitaj de S-roj Délio Pereira de Souza en la antaŭurbo Penha kaj de S-ro Haroldo Leite Pinto ĉe la "Brazila Spiritisma Federacio". Pri tiuj ekzamenoj kaj ankaŭ pri la bela ekskurso al Juiz de Fora organizita de tiu Asocio ni detale parolas aliloke.

En ĝenerala kunsido oni decidis starigi komitaton, konsistantan el S-roj Délio Pereira de Souza, Antônio Saraiva Varão kaj Francisco Doblas Filho por organizi planon por starigo de Esperanto-Domo en apudmara loko por servi kiel ripozejo de la asocioj dum la semajn-finoj kaj ferioj.

La estraroj de tiu Asocio kaj de la Esperanto-Klubo ĉe la Kristana Asocio de Junuloj interkonsentis pri la starigo de programo de kultura interŝanĝo, pere de vizitoj de la anoj de iu asocio al tiuj de la alia.

La A. E. R. J. festis la naskiĝan datrevenon de D-ro Zamenhof per kunsido ĉe la sidejo de la Bonfara Kaso de la Civila Gvardio, dum kiu paroladis S-roj Délio Pereira de Souza, Octaviano da Silva Lopes, Celso Alves Rosa kaj S-ro Roberto das Neves en la nomo de la E. K. K. A. J., Fino Maria Amaral Malheiro legis salutan leteron de B. K. E. Pro ĝentileco de la prez. de la Asocio prezidis la kunsidon S-ro A. Couto Fernandes, prez.

de B. L. E., kiu salutis la Asocion.

Ĉe la sidejo de la "Centro de Vigilância Democrática de Anchieta" S-ro Aldino de Freitas malfermis kurson de Esperanto iniciatitan de ĝia Departemento de Kultura Disvastiĝo.

"Reformador" aperigis diversajn notojn kaj artikolojn, el kiuj ni citas tri, kies titoloj estas: "La Trovita Feliĉo", Enkonduko en la Studadon de la Spiritisma Doktrino" kaj "La Martiro de la esperantistoj". En la periodaĵoj: "A Gazeta da Farmácia", "O Farmacêutico Brasileiro" kaj "Bairros" aperis interesaj artikoloj de S-ro A. Caetano Coutinho. "Juventude Unida", oficiala bulteno de la Internacia Societo de Studentoj" publikigis artikolojn de S-roj Antônio S. Varão, José Barroso Junqueira, Aldino de Freitas kaj Olindo Barbosa Freitas.

VELKAS ĈIU BRIL'

(Kanto)

Thomas Moore (poeto angla, 1779 — 1852).

Velkas ĉiu bril',
se iĝis ĝi plej hela;
ĝojo fuĝas for,
se iĝis ĝi plej bela.

De l' lumsteloj fal',
mallonga viv' de l' floroj
estas tip' de ĉio ajn
agrabla al la koroj.

Velkas ĉiu bril',
se iĝas ĝi plej hela;
ĝojo fuĝas for,
se iĝis ĝi plej bela.

Ne valoras ĝu',
se ĝi per ve' finiĝas;
ni ne fidu al
ligil' se ĝi rompiĝas.

Mi preferas ja
en plenmallumo kuŝi,
ol vidi lumon en fuĝad'
ĉiama, sen ĝin tuŝi.

Velkas ĉiu bril',
se iĝis ĝi plej hela;
ĝojo fuĝas for,
se iĝis ĝi plej bela.

Esperantigis F. V. Lorenz.

BIBLIOGRAFIO

ESPERANTISTA GAZETARO

ROMEO KAJ JULIETO — Tragedio en kvin aktoj de William Shakespeare. El la angla originalo tutproze tradukita de Stephen A. Andrew. 1945. The Esperanto Publishing Co. Ltd. Anglujo.

Tre interesa traduko proza de tiu ĉefverko de Shakespeare, kronologie la unua tragedio de li verkita.

Malgraŭ la multaj esprimoj uzitaj de Shakespeare kaj nuntempe arkaikaj, kaj precipe en la du unuaj aktoj, la nombraj vortludoj kaj vorskritoj, la tradukinto forigis ĉiujn malfacilaĵojn en sia traduko, kiun oni legas facile kaj agrable. Ĉiu esperantisto devas posedi tiun valoran tradukon. Prezo:

KIU ESTAS KIU INTER USONAJ ESPERANTISTOJ. 1945. 62paĝa broŝuro kompilita de F. A. Postnikov. Little Rocu, Ark., Usono. Prezo: Unu dolaro. Tre utila por la amikoj de interkorespondado.

LA ESENCAJ TRAJTOJ DE LA KVAKERISMO. Informa letero al iu, kiu interesiĝas pri la "Society of Friends". Eldonita de la "Friends Service Council". Friends House, Euston Road, London, N.W.I. Anglujo.

JUAN IGNACIO MARIA DE CASTORENA URSUA Y GOYENECHÉ. PRIMER PERIODISTA MEXICANO. Edicion de los Talleres de Impresion de estampillas y valores de la Secretaría de Hacienda Y. C. P. como complemento a la emision de estampillas postales conmemorativas de la "Tercera Feria del libro y Exposicion Nacional del Periodismo y primera de Cine y Radio. Talleres de Impresion de Estampillas y Valores. Palacio Nacional. México. D. F.

ANAIS DA SOCIEDADE BRASILEIRA DE FILOZOFIA. Ano IV — 1943 — 1944 kun 150 paĝoj. Ĝi enhavas la paroladon faritan de S-ro A. Couto Fernandes okaze de ties ekposedo kiel ano de la Societo.

ESTADÍSTICA. Organo de la Sociedad Colombiana de Estudios Estadísticos. Numero 2 — Segunda época. Bogota — Colombia. Junio de 1945.

"ESPERANTO, DE TWEEDDE TAAL VOOR IEDER!" (Esperanto, la dua lingvo por ĉiu!) (Eldonis: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brussel-West. Prezo afrankite: 4 belg. fr. aŭ unu int. respondkupono. — Vere bela kaj plaĉaspekta afiŝeto tri-kolora (22 x 33,5 cm.) por pendi ĉe fenestroj. Laŭ tre originala maniero ĝi elvokas la lingvan konfuzon kaj montras ties solvon per Esperanto. Praktika estas la libera spaco sur ĝi, ebligas eventualan aldonon de utila indiko: anonce pri kurso, ekspozicio, parolado, kunveno, k. t. p. Modernaspekta progandilo, tre efika por la uzo en la regiono de la nederlanda lingvo.

GRUPOJ ALIGINTAJ AL B. L. E. SANGOJ:

S. PAULO ESPERANTA KLUBO. — (1937). Sidejo. Avenida S. João, 126 — s.loja. Poŝtkesto 5.888. São Paulo. Est. S. Paulo.

PETROPOLISA ESPERANTA GRUPO. (1944). Rua Alencar Lima, 42. Petrópolis. Est. do Rio.

ESPERANTISTA SOCIETO DE PORTO ALEGRE. (1945). Rua S. Carlos, 1192. Porto Alegre. Rio Grande do Sul.

"ESPERANTO INTERNACIA" — Oficiala organo de "Internacia Esperanto-Ligo". Herongate. Anglujo. Julio-Aŭgusto kaj Sept. — Okt. 1945.

"ARGENTINA ESPERANTISTO", organo de "Argentina Esperanto-Ligo". Buenos Aires. Argentino. Aŭg. 1945. Detala informo pri la 3a Kongreso de Esperanto.

"EL I. C. A.", organo de la Instituto Comercial Arrieta. Oruro. Bolivio. Aŭg. 1945.

"LA RONDO". Oficiala organo de la "Aŭstralia Esperanto-Asocio. Victoria. Aŭstralio.

"THE BRITISH ESPERANTIST", oficiala organo de "The British Esperanto Association". Londono. Anglujo. Sept. — Okt. 1945.

"AMERICAN ESPERANTIST", oficiala organo de "Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko". New York. USONO. Jul.-Aŭg. 1945.

"PERNAMBUCO ESPERANTISTA". Oficiala organo de "Pernambuka Esperanto-Asocio". Recife. Pernambuco. Jun. — Jul. 1945.

"ETA HEROLDETO". Willoughby. N. S. W. Aŭstralio. Aŭ Sept. 1945.

"MONDA BONVOL-SERVO". Saline, Michigan. U. S. A. Jun., Jul., Aŭg., Sept., Oktobro 1945.

"LABORISTA ESPERANTISTO". Organo de la "Federacio de Laboristaj Esperantistoj". Amsterdam. Nederlando. Jul., Aŭg., Sept., Okt. 1945.

"IRLANDO VOKAS". Dublin. Irlando. Sept. 1945.

"STELETO ROSARIA". Organo de "Rosaria Esperanto-Asocio. Rosario. Argentino. Sept kaj Okt. 1945.

"LA VERDA FLAMO". Organo de "Maroka Esperanto-Asocio". Casablanca. Maroko. Majo 1945.

"THE PACIFIST-ESPERANTIST BULLETIN". Pownal, Maine, U. S. A. Sept. 1945.

"INTERNA BULTENO". Organo de "Palestina Esperanto-Ligo". Kongres-numero. Jerusalemo. Palestino. Jun. 1945.

"RENOVIGO". Meksiko. Meksiko. Jul. kaj Aŭg. 1945.

"LA STELO BRILANTA". Perioda folio. Marseille. Francujo. De 29 Aŭg. ĝis 19a Sept. 1945.

"PER UNU VOĈO". Organo de la "Laborista Esperanto Kumularo". Johannesburg. Suda Afriko. Jun-Jul., Sept.-Okt. 1945.

"NEW ZELAND ESPERANTIST". Wellington. Nova Zelando. Julio 1945.

"FLANDRA ESPERANTISTO". Organo de "Flandra Esperanto Instituto". Brussel. Belgujo Aŭg., Sept. Okt. 1945.

"SVISA ESPERO". Oficiala organo de "Svisa Esperanto-Societo". Berne. Svisujo. Jul. — Aŭg. 1945. Bonaj informoj: "La Cesh-Instituto relevigas. Prof. Christaller, la aŭtoro de "Esperanto-Deutsches Werterbuch" komunikas ke esperantistaj grupoj jara renaskiĝas en Stuttgart kaj Karlsruhe.

"LA VERDA FOLIO" Oficiala organo de la "Monda Ligo de Naturamantoj. Painswick. Anglujo. Majo kaj Okt. 1945.

"AFRIKA VICO". Informilo. Pretoria. Sud-Afriko. Aŭgusto 1945.

"ESPERANTISTA BAHIANO". Salvador. Bahia. Jan. — Marto 1945.

"DANSK ESPERANTO-BLAD". Eldonata de "Centra Dana Esperantista Ligo". Viborg. Danujo. Septembro 1945.

Ĉiu, kiu deziras ricevi kopion de la Moriga Folio aŭ de Poŝtkarto kun la portreto de Zamenhof kun la du memorigaj poŝtmarkoj stampitaj je la dato de la fermo de la Deko Kongreso kaj stampaĵo farita de speciala stam-

pilo kun la portreto de Zamenhof kaj teksto en Esperanto, sendu peton al BRAZILA LIGO ESPERANTISTA — Praça da República, 54. Rio de Janeiro. Brazilo, akompanatan de dolar-triono aŭ ses respondkuponoj.

	Cr\$
DICIONÁRIO ESPERANTO-PORTUGUÊS, por A. Couto Fernandes e Carlos Domingues. Encadernado	25,00
DICIONÁRIO PORTUGUÊS-ESPERANTO, por A. Couto Fernandes, Carlos Domingues e Luiz Pôrto Carreiro Neto. Encadernado — Cr\$ 30,00. Cartonado	25,00
Karlo, facila legolibreto, de Edmond Privat	3,00
Encomendas à Brazila Ligo Esperantista — Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro. Os sócios da Liga teem direito a um abatimento de 10 %.	

Presejo: Irmãos Pongetti.